

VI-a
RENKONTIĜO DE PACDEFENDANTOJ
23-25. 3. 1984
KD RSM DUKLA, CS PARDUBICE

ESPERANTO
EN LA SERVO DE L' PACMOVADO



LA BELGA AMBASADORO GLOVAERTS TRASPRENAS
HUMON EL ZÁMEČEK POR BELGA MEMORLOKO LIÉGE



1984-2-101
starto

ĈIU-TAGE ABELAN MIELON

Pano kun mielo, butermiela ĝmirado, kazeo kun mielo kaj ovo, mielan bakaĵon vi trovos kiel bonegan frandaĵon.

MIELO fonto de la forteco, beleco kaj sano,



Kooperativa produkta kaj komerca uzino en urbo Zvolen, filio MEDOS-GALANTA produktas:

- mielon en la vitro 500 g
- mielon urseton 340 g
- mielon porcigitan en ujetoj 30 g
- mielon kun patrina kaĉeto 250 g
- mielon kun la enhavo de natura poleno 250 g

Notitajn produktojn en la praktika pakado mi povas aĉeti en ĉiuj nutraĵvendejoj en Slovakio.





Akcepto en la urbodomo. Por bona sukceso de la 6a Renkontiĝo tostas la urbestro/meze/ kaj pliaj urbaj funkcioj.

Partoprenis reprezentantoj de ĉiuj naciaj delegacioj, kiuj partoprenis la renkontigon

Akcepto en la regiona urbodomo en urbo Hradec Králové. Viceprezidento de la regiona nacia komitato konatigis la partoprenantojn kun la atingoj de la regiono kaj debatis kun reprezentantoj pli ol 2 horoj.



Partoprenantoj ankau vizitis la memorlokon LEŽÁKY kien ili metis la florojn al mortintaj dum la nazia epoko



EKŖPOZICIOJ

1. Hiroŝima kaj Nagasaki avertas

2. 15 ĵeroj de la Ĉeĥa Esperanto - Asocio en la porpaca agado.



3. DESEGNAĴOJ de Pavel Rek kontraŭ la milito .

/ Sur foto la aŭtoro /.



Magezenoj en urbo estis ormanitaj per efisoj, kiuj invitis partoprenantojn de la 6a Renkontigo en Pardubice.

Ĝi sementpe estis bona kaj tauga propagando de la Movado.

Parto de la reprezentantoj el kapitalismaj landoj sur podio en momento, kiam ilin salutis niaj infanoj kun floroj sidas apud de reprezentanto el Sovetunio.

El maldekstro: Gilbert /F/, Trask/ GB/, Boer/NL Skupas/ SU/



Kiam aliaj dormis, amuzis au ripozis si - dis grupo de la homoj kiuj prizorgadis ĉion necesen por la glata procedo de la 6a Renkontigo.

Ĉar al multaj nekona- teĵ ni nun enoncas iliejn nomojn. El maldekstro/Städlerová, Pokorná, Srbová, Hemerková kaj Franc/.

LA 6-A RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-PACDEFENDANTOJ EN PARDUBICE



La 6-a Renkontiĝo de Esperantistoj-Pacdefendantoj en PARDUBICE povas sendispute havi kelkajn "PLEJ".

En la tagoj 23. - 25.3. kunvenis ĝis nun plej multe da homoj kaj ŝajnas, ke tiuj ĉi kvanton oni jam ne povas superi, precipe pro teknikaj kaŭzoj. Pli ol 600 personoj demonstris sian decidan defendi la pagon. Venis plej multe da personoj el ĝis nun plej multe da landoj. Super 180 personoj el 11 landoj de Eŭropo komune kun niaj civitanoj manifestis la sopiron je vivo sen militoj kaj la danĝero de atoma morto. Decidege ili kondamnis la dislokadon de la nukleaj potencioj en la okcidentaj ŝtatoj, kiuj, bedaŭrinde, devas esti ekvilibrigite eliminataj per dislokigo de strategitaktikaj sistemoj ĉs ni kaj en GDR. Granda plejparto de la sketerlandaj gastoj klare ekkomprenis niajn historiajn malbonajn spertojn el antaŭ pli ol 45 jaroj kaj sekvojn de tiamaĵ klopodoj oferi nin por ke estu savita la paco en Eŭropo.

Estas ankoraŭ frus en la tempo, kiam estas skribata ĉi tiu artikolo, plene pritaksi la signifon de tiu ĉi okazigaĵo. Sed jam hodiaŭ direblas, ke per sia amplekso kaj enhavo ĝi ne havas analogion en la Esperanto-movado kaj ne nur ĉe ni.

Necesas ankaŭ danki al la organizintoj, precipe al ĉiuj, kiuj bonege zorgis pri la logigo kaj nutrado, sed por tiuj, kiuj alveturis neanoncite aŭ es pli frus.

Necesas danki al tiuj, kiuj sekurigie organizis aŭ rekte realigis la programon, ekspoziciojn, traktadojn ĉe la plejdiversaj instanc-organoj, kiuj oferis sian liberan tempon kaj dum semajnoj gisnokte solvadis nesolveblaĵojn. Se ni nomus kelkajn, certe ni senvole forgesus aliajn.

Permesu al mi, ke al vi ĉiuj almenaŭ ĉi-maniere mi ankoraŭ foje danku, vi FRANC-oj, HEMERKA-oj, KLEMENT-oj, laborantinoj de la sekretario de UEA, geedzoj SRB kaj devoj da pluaj.

Se vi ne estus, ne estus la 6-a renkontiĝo de la pacdefendantoj en PARDUBICE, estus nek la seriozaj nek la gajaĵaj momentoj, ne estus la pistata transdono de humo el lokoj martirigitaj inter la Kasteleto de PARDUBICE kaj la belga LIEĜO, kiun ĉeestis la belga konsulo en ĈSSR, ne estus ligitaj multaj amikecoj, ne ekkonus sin reciproke homoj kaj eble, ke iuj pensus, ke la Esperanto-movado setas tia, kiu distancigas de politikaj problemoj de la mondo. Kaj tio ja ne veras.

Sed ni devas denove kun bedaŭro konstati, ke malgraŭ invito al ĉefaj reprezentantoj de UEA al tiu ĉi renkontiĝo, nur la sekretario de UEA D-rino Flora SZABO-FELSO aŭdigis sin, ke ŝi ne scias ĉu ŝi povas alveturi. La ceteraj es ne respondis. La renkontiĝon neniu el la estraro de UEA partoprenis.

Sur kelkaj fotoj ni povas reamorigi al ni la momentojn, kiam la delegitaroj estis akceptitaj far la urbaj, distriktaĵ kaj regionaj organoj, kiam ni ĉeestis la pietatajn okazigojn kaj traspekton de UTK /Unueca terkulturista kooperativo/, kie estis akceptita precipe la grandnombra eksterlanda delegacio.

Ĉi tiu okazigaĵo estis ankaŭ centro de atento de la publikaj komunikiloj de televido komencante kaj per ĵurnaloj finance. Dum la renkontiĝo eluzis la eblojn la asociaĵ sekoj por konsiligoj kaj intersaĝo de spertoj kun la aliaj partoprenantoj. Kunvenis la lernantoj de la skribaĵ kursoj kun la plejparto de siaj instruantoj.

Alfine mi volas diri, kiel unu el tiuj, sur kiuj kuŝis respondecado pri la sukcesa trapaso de tiu ĉi renkontiĝo, ke mi ĝojas, ke la dediĉita laboro kaj la maldormitaĵ noktoj ne estis vanaj.

Zdenko KRÍMSKÝ

DEKLARO EL BAD SAAROW

La reprezentantoj de Esperanto-asocioj el socialismaĵ landoj/Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio/, partoprenintaj la 17-an Konsultiĝon la 26-an - 31-an de marto 1984 en BAD SAAROW, pritraktis diversajn aspektojn de sia kunlaboro en la nuntempa internacia politika situacio, priakriginta pro la instalaĵo de novaĵ usonaj raketoj en Eŭropo, esprimis sian plenan subtenon al la proponoj de la socialismaĵ landoj pri malarmado kaj paca kunekestado.

Ili substrekas la grandan signifon de la malstreĉiĝo por la intersaĝo de kulturaĵ valoroj inter ĉiuj nacioj.

La partoprenintoj alvokas la esperantistaron pliintensiĝi la ĝisnunajn aktivecojn POR PACO KAJ INTERKOMPRENIĜO kun la celo sekurigi tiel ankaŭ la basajn kondiĉojn POR LA SUKCESA EVOLVO DE LA ESPERANTO-MOVADO.

Bad Saarow,
la 30-an de marto 1984.

Upozornění všem členům

Jak jste se dozvěděli ve Startu č. 1/84 provádíme část administrativních prací, především evidenci členů, na počítač. Abychom mohli včas evidovat všechny změny týkající se vaší osoby je nutné abyste uváděli ve vašich dopisech a připomínkách členské číslo vaší legitimace. Nad vaší adresou na Startu č. 2/84 které máte právě v rukou, je vaše členské číslo uvedeno. Doporučujeme, abyste si ho opsalí a měli vždy po ruce. Jinak se může stát, že vyřízení vaší korespondence bude trvat delší dobu, protože jste evidováni pouze tímto číslem v paměti počítače.

Děkujeme za porozumění.

52-a INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ EN TIRRENIA

Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj /IABE/ organizas la 52-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en la kadro de festivalo de la itala kulturo ITALIO - KULTURO KAJ NATURO. Ili okazos de la 21-a ĝis la 30-a de junio 1984 en TIRRENIA /Pisa/ en CENTRO STUDI DELL' UIC G. FUCA.

TIRRENIA estas bela banloko de toskana-tirena marbordo, kie troviĝas kelkaj el la plej elegantaj strandoj de Italio. Ĉiuj, blindaj aŭ vidantaj esperantistoj, estas invitataj por ĝui kune ĉarman ripozlokon, pli profunde ekkoni la italan kulturon kaj ekligi amikajn rilatojn.

La logado estas aranĝita parte en la CENTRO mem, parte en proksimaj hoteloj.

La 52-a IKBE havos kiel ĉeftemon LA BLINDA VIRINO EN LA NUNTEMPA SOCIO.

La kultura festivalo konsistos el prelegoj kaj spektakloj pri italaj historio, muziko, literaturo, scienco kaj socio. La prelegoj okazos posttagmeze. La vesperoj estos dediĉitaj al koncertaj, teatraj, filmaj, folkloraj, poeziaj, kvizaj kaj societ-amuzaj programoj. Oni ankaŭ antaŭvidas mallongajn kursojn pri la itala lingvo kaj pri Esperanto /por komencantoj/ kaj sakturniron. Se eble, oni aranĝos kurson por nenagantoj. Detala programo aperos en sekvontaj komunikoj.

La aligkotizo estas 40.000 italaj liroj ĝis la 31-a de januaro 1984 kaj 50.000 italaj liroj ĝis la 31-a de marto 1984.

La aligkotizo donas la rajton partopreni en ĉiuj aranĝoj de la kongreso kaj de la festivalo kaj en du ekskursoj: unu tutage al FLORENCO kaj unu duontaga al PISA.

La blinduloj pagos duonan aligkotizon; la blindulguidantoj tute ne pagos ĝin.

La restadkoste popersono estas por la tuta periodo 282.000 italaj liroj en dulitaj ĉambroj kaj 232.000 italaj liroj en kvarlitaj ĉambroj. Ĉiuj ĉambroj havas siajn higienajn servojn. La kotizoj inkluzivas tranoktadon, tri manĝojn potaĝe kaj la uzadon de la strando kaj strandaj instalaĵoj. Ili ankaŭ inkluzivas la dumangajn trinkaĵojn por tiuj, kiuj logos en la CENTRO. Tiuj, kiuj logos en la hoteloj /iom pli luksaj/ devos aparte pagi la trinkaĵojn. La menciitajn kondiĉojn oni certigos al la unuaj 200 aligitaj; aliajn aligojn oni akceptos kun rezervo, ĉiukaze antaŭ la 31-a de marto 1984.

La aligkotizojn kaj garantiaĵon de 70.000 italaj liroj popersono /kiu ne estos redonita en kazo de rezigno/ oni pagu nepre antaŭ la 31-a de marto 1984 pere de la poŝta ĉekkonto n-ro 12586608 titolita "52-a INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ, via Rismondo I, 60123 ANCONA".

Korespondantojn oni sendu: BRAJLE AL: Daniela BOTTEGONI, via Rismondo I, 60123 ANCONA /Italio/, tel. 31602 posttagmeze kaj vespere; NIGRESKRIBE AL: Michela LIPARI, via Tivaroni 5, 00143 ROMA /Italio/.

Jen la organiza komitato: D. BOTTEGONI, R. CORSETTI, P. L. DA COSTA, V. De FILIPPO, A. GRASSINI, M. LIPARI kaj L. TOLA.

LA ENIGMO PRI FR. V. LORENZ SOLVITA?

La preparado de la "Historio" de S. KAMARÝT instigis serĉi la precisan tempon, en kiu František Vladimír LORENZ / en Brazilo Francisco Valdomiro LORENZ/, aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto por ĉeĥoj /1890/, instruis en PRAGO Esperanton, do la tempon de la unua E.-kurso sur nia teritorio. Lia kamaradino kaj lernantino Běla KRAPKOVÁ-RAICHLOVÁ atestas /en "Esperantista", Praha, 1947, 7, p.83/, ke ŝi interrilatadis kun FVL en laboristaj kunvenoj "U Pětrossá" en la jaroj 1889/90. "En kultura rondeto, kiun gvidis studentoj, ankaŭ LORENZ estis aktiva, instruante nin Volapük, sed tuj, kiam atingis lin informoj pri Esperanto, li komencis labori por ĝi. Li do efektive estas la unua propagandanto de Esperanto ĉe ni."

Surbaze de noteto en la postlasaĵo de Julie ŠUPICHOVÁ mi trovis /kaj d-ro B. BÄUBER, CSo, el la Instituto de Historio ĉe la Akademio de Sciencoj lau mia peto volonte tradudis - estante novbakita lorenzologo - la tekston en la ŝtata biblioteko en Praha/, ke LORENZ publikigis en la jaro 1935, en kelkaj numeroj de la gazeto "Samostatnost" en Praha, siajn rememorojn. Fotokopion de ĝia tajp-teksto, skribita de FVL mem, dumtempe akiris el Brazilo d-ro V. NOVOBILSKÝ, CSo, kiu iam korespondis kun Waldomiro /filo/ LORENZ. Komparante ambaŭ tekstojn mi konstatis ilian plenan identecon. La rememorojn "Z MÝCH VZPOMÍNEK" LORENZ verkis post insistado el PRAGO por siaj estintaj politikaj amikoj, do eble pro tio li ne parolas tie pri sia poresperanta aktiveco, kun du esceptoj: mencio pri eldono de la unua lernolibro kaj pri provo propagandi Esperanton en la gazeto "ZÁR".

El la Rememoroj mi nun scias la tempon de la praga restado de FVL: marto 1891 - majo 1892. Ĝen ekostas la demando: ĉu FVL ekinstruis Esperanton en PRAGO lau la indiko de RAICHLOVÁ, t.e. 1889, aŭ nur en la jaro 1891?

Mi insistis ĉe la filo de LORENZ, Waldomiro, elserĉi por mi la jarojn de instruado de Esperanto en PRAGO fare de lia patro. Li ne tuj scias kaj korespondis tiucele kun sia bofrato Josef BIESZCZAD /ŝtato Santa Catarina/, kiu ofte parolis kun FVL pri la esperantista movado. BIESZCZAD, lau interpreto de Waldomiro, opinias, ke fininte siajn studojn /en la 6-a gimnasia klaso en KOLÍN/ kiel 19-jara, "nun li povis preni la decidon iri al Praha por instrui Esperanton, en 1891. Ieh glaus es ganz stimmt, mein Lieber." /T.e. "mi kredas, ke tio plene kongruas, mia kara.", J.M./ La antaŭtempa studofino, pro minaconta tuberkulozo kaŭze de malsatado, estis iam fine de 1889 aŭ komence de 1890.

Prenante kiel bazon la loĝadon de FVL en PRAGO/1891-92/ kaj la eldiron de BIESZCZAD, oni povus - iam senatente - konkludi, ke FVL ekinstruis Esperanton en PRAGO en 1891. SED: 1/ ni scias precize, ke LORENZ antaŭ E. lernis Volapük kaj verkis en ĝi, 2/ RAICHLOVÁ atestas, ke dum ŝia vizitado de la laboristaj kunvenoj "U Pětrossá" en la j.1889 LORENZ instruis al ili volapukan /Volapük/.

Lumon en la aferon alportis sciigo de Waldomiro LORENZ el

PORTO ALEGRE, datita 1983-02-11, en kiu li jene reproduktas parolojn de sia patro:

Pri F. V. LORENZ. /Li mem parolas/: "Kiam mi aĝis 15 jarojn /1887/, mi lernis la internacian lingvon Volapük, sed post du jaroj /1889/ MI TROVIS ESPERANTON PLI BONA; mi estis tiam aĝanta 17 jarojn; TIO OKAZIS EN 1889; en 1890 mi publikigis la unuan lernolibron de E. por la ŝeĥoj".... "En la komenco de septembro /1893/ mi decidis translokigi Brazilon ...".

/Lau la "Rememoroj" ni scias, ke LORENZ, pacama kaj talenta bonkorulo, volis eviti militservon por la aŭstria imperiestro per sensukcesa provo atingi Francion kaj ke en Brazilon li elmigris kun fremdaj dokumentoj./

Post la serĉado kaj enketado en ĈSSR, Brazilo kaj Hungario mi KONKLUDAS:

El la atestoj de RAICHOVÁ kaj de Waldomiro LORENZ rezultas la neesa konkludo KONTRAŭ ies opinio, ke FVL komencis instrui Esperanton en PRAGO nur en 1891: ja de 1889 li estis esperantisto /kun la n-ro 1276, lau HOLZHAUS, en la Zamenhofa adreso, aperinta en 1892, n-ro 3 de "La Esperantisto" /, LI DO NE POVIS ANKORAŬ EN 1891 INSTRUI EN TIU URBO VOLAPUKON! Restas akcepti, surbaze de RAICHOVÁ, apogita de la indikoj de Waldomiro LORENZ, ke F. V. LORENZ INSTRUIS EN PRAGO VOLAPUKON ĜIS LA JARO 1889 /ĜIS IU TIES PARTO/ KAJ ESPERANTON DE 1889 /DE TIES IU PARTO/. Lau tio LA KOMENCO DE ESPERANTO ĉe ni troviĝas en la JARO 1889.

La jaron 1889 subtenas aŭ konfirmas la atesto de František HAJEK, kiu frekventis kun sia patrino la Lorenc-kurson: "Ĉe ni en Praha Esperanto havis jam de la jaro 1889 karakteron soci-revolucian ..." /Letero al J. ŠUSTR, 1959-05-08/. D-ro Fr. SOUKUP en sia verko "Revoluce práce" atestas: "En la jaroj 1890-aj Esperanto estis en proksimaj rilatoj al OMLADINA."

Restas la demando: ĉu FVL, studento en KOLÍN /ĝis 1891/, povis jam en 1889 prelegi pri E. kaj instrui ĝin en PRAGO? Nia opinio ne estas alia ebleco ol akcepti, ke la juna LORENC veturadis en PRAGON, regule aŭ neregule, el KOLÍN /60 km fervoĵe/. Li tiutempe jam perlaboris iom per publikigado de artikoloj en socialismaj gazetoj, kaj en 1890 li eĉ povis eldoni praktikon sian lernolibron. BIESZCZAD krome, menciante la restadon en PRAGO, aldonas, ke "la societo pagis liajn kostojn." Ni supozu, ke tiu financa helpo povis okazi jam pli frue ol en 1891, eble en la formo de honorarioj por la prelegoj "U Pětostá"

Sub la lumo de la donitaĵoj aperas, ke la jaro de esperantistigo de F. V. LORENC, 1887 /lau L. COURTINAT en "Historie de Esperanto", 1966, kaj A. HOLZHAUS en "Doktoro kaj lingvo Esperanto", Helsinko, 1969/ ne kongruas kun la realo. Nisto - rie interesa kaj denove cerbumiga estas la indiko de HOLZHAUS, ke FVL esperantistigis en PRAHA-SMICHOV !/.

Fine, mi uzas la okazon por aldoni du novajn faktojn pri FVL. La listo de verkoj de FVL en Bohemio kaj Brazilo enhavas 83 titolojn /inkl. negrandajn laboraĵojn/. Antaŭ sia morto FVL sciis 104 /!/ lingvojn kaj verkis vortarojn aŭ gramatikojn de lingvoj tute ekzotikaj, ekz. tupia, aŭ vortareton de iu turka dialekto. Vidu "Esperanto kiel revelacio", Araras /SP/, Brasil, 1976, 159 plug 14 p.

/Vidu ankaŭ la artikolon "Ĉe la lulilo de Esperanto", Star-
to, Praha, 1977, 4 - 5, p. 9 - 10/.

Tiu ĉi eseo estu kompletigo al la enhavo de la lasta alineo
sur la p. 17 de la "Historio de la E.-Movado en Ĉeĥoslovakio".

Mi dankas al W. LORENZ, J. BIESZCZAD /Braz./ kaj Bernard
GOLDEN /Hung./ pro ilia helpo.

Jaroslav MAŘÍK

ESPERANTO KIEL FONTOLINGVO

En la beletra revuo FONTO /n-ro 39/ aperis artikolo de Jiří
KAREN, Prago, sub la titolo BAZARO DE BONAJ IDEOJ. La kauzo, ke
mi ne en FONTO respondas al li, estas simpla: mi konsentas kun
li. Krom tio, pri ĉi tiu temo aperis jam artikolo de mi en la
revuo kaj ankaŭ en BUDAPEŝTA INFORMILO sub la titolo: LITERA-
TURAJ VERDAJ MUROJ.

Pri la neceso traduki Esperantajn verkojn nacilingven, ne ĉiu
havas la saman opinion. Nome, se la esperantistoj tradukas en
naciajn lingvojn siajn ĉefverkojn, tio ne instigas la neesper-
antistojn lerni Esperanton por legi ilin en originalo. Kiel
lerni lingvon kies ĉefverkojn mi povas legi en mia propra ling-
vo? Per la tradukado ni baras al la homoj la vojon al Espe-
ranto. Sed levigas la demando: Ĉu la popoloj de malgrandaj ling-
voj ne per la tradukado en la grandajn lingvojn konatigas siajn
literaturojn? Kaj Esperanto apartenas al ili. Vane aperas
angle, france, ruse, ĉine ... kia ajn fama, bonega, belega ver-
ko, eĉ Nobel-premiita, neniu tuj eklernas tiun lingvon nur pro
tio, ke oni povu ĝin legi en la originala lingvo.

Cetere, ellerni kiun ajn lingvon tianivele ... apenaŭ ima-
geblas. Prefere oni atendas la tradukon en sia lingvo. Kaj mia
opinie, tio rilatas ankaŭ al Esperanto vane ĝi estas facila. Se
mi diras al iu, ke aperis valora, interesa, vera literaturaĵo
en Esperanto, mia partnero rajte povas diri, ke se jene estas,
se temas pri ĉefverko, certe ĝi estos tradukita en diversajn
lingvojn kaj tio okazos pli rapide ol mi povus ellerni Espe-
ranton kaj ĝi la legadon en la originala lingvo. Li eble al-
donus: Mi havas bonegajn tradukistojn, kiuj tute certe povoscios
redoni la belecon de la originalo. Ja, la plej granda parto de
ĉiu nacia literaturo estas traduko. Ĉu li/si ne pravas? La celo
de la lingvolernado - generale, eĉ plejparte - ne estas legi
literaturajn verkojn. Tamen ĉi-kaze Esperanto estas escepto,
ĉar ĝi ne estas uzata tutmonde kiel la mondlingvoj.

En la plimulto de la landoj, kie troviĝas Esperanto-movado,
vivas bonaj, eĉ bonegaj Esperanto-tradukintoj. Lau la difino
de PIV, tradukisto: homo kies profesio estas la tradukado. Mi
ne scias, kiom da tradukistoj esperantistaj vivas niatempe? Ĝe-
nerale la tradukado el naciaj lingvoj en Esperanton /kial uzas
kelkiuj: el iu lingvo AL iu lingvo?/, ne kaŭzas problemon. Sed
inverse jam levigas la problemo. Tiukaze jam necesas scii la
nacion lingvon sur verkista, tradukista nivelo. Do, por ĉi tiu
laboro necesas la helpo de konata nacilingva tradukisto, ĉar de
tiu la eldonejo pli volonte akceptas tradukon. Kaj se tiu tra-

dukisto ne scias Esperante? Tiam la traduko nacilingven okazas el KRUDA TRADUKO, kiun faras Esperanton bonege scianta esperantisto. La problemo certe estas solvebla, se estas KION TRADUKI EL ESPERANTO? Ne gravas, ke la tradukota libro estu ĉefverko /ĉu estas tia en Esperanto?/, sed la legeman publikon interesanta romano, rakonto, novelaro.

La libreto de Tibor SEKELJ: KAMEŬAŬA, LA FILO DE LA ĜANGALO estas tradukita en dekkvin lingvojn kaj ĵus mi legis, ke en Japanio ĝi aperis jam en la tria eldono. Malgranda libro, sed ĉarma historio, ne mondliteraturo, sed enhance tre interesa, neĉiutaga rakonto. Do, ni ne rompu la kapon al ni por trovi ĈEFVERKOJN.


Estas fakto, ke la legantaro de kiu ajn libro tradukita el Esperanta originale, estas pli multnombra ol la nombro de la esperantistaj legantoj. Jen hungara ekzemplo. S. SZATHMÁRI: Maŝinmondo /STAFETO, 1964/. Ĝi aperis ĉ. en mil ekzempleroj. Post dek jaroj ĝi estis ankoraŭ aĉetebla. En la hungaran tradukis la aŭtoro kaj la eldonnumero estis dekmil. En kelkaj jaroj ĝi elĉerpigis. C. ROSSETTI: Kredu min, Sinjorino! /Tradukis S. Szathmári/. La Esperantan eldonkvanton mi ne konas; la hungara estis dekkvin mil. Rapide vendigis. Naŭ verkoj de J. BAGHY estis tradukitaj en diversajn lingvojn. /Kiu la temo interesas, konsultu la libron: ESPERANTO EN PERSPEKTIVO, p. 241./ Kiu aŭ kiu biblioteko kolektos la nacilingvajn tradukojn de Esperantaj verkoj kaj kiam?

Do, por fini la temon, kiu tute ne estas elĉerpita, nur tuŝita, LA IDEALA SOLVO estus, se iu Esperanta originala verko estas eldonita en iu nacia lingvo, ĝi eliru ankau en kelkaj aliaj naciaj lingvoj. Post la tria nacilingva eldono, la kvara, kvina, do, la sekvaj lingvoj jam havas pruvon, faritan vojon, sukceson antaŭ si. Ekzemple: favorajn recenzojn, sufiĉe grandan eldononombrom, relative rapidan vendadon, promeson pri nova eldono ktp. Gravus, ke pri ĉio ĉi sciu tuj tiuj, kiuj planas eldoni en siaj gepatraj lingvoj la saman Esperantan libron. Nur jene ili havas argumentojn, dokumentojn por pruvi, ke temas ne pri laspeca nekonata, senvalora libro. Granda avantaĝo, vera bonŝanco estas, se la landa movado havas tre konatan esperantistan - ne Esperantan - verkiston aŭ neesperantistan, sed kun Esperanto simpatiantan faman verkiston. Lia aŭtoritato povas defendi Esperanton kontraŭ stultaj kalumnioj, precipe sur literaturo tereno. Eble la situacio en kelkaj landoj estas matura por fondi PEL-Klubon /Por Esperanta Literaturo-Klubo/ - la nomo similas al PEN Klubo - en kiu kune agadus esperantlingvaj verkistoj, tradukistoj, dulingvaj /Esperantaj-nacilingvaj/ verkistoj - tradukistoj kaj kun Esperanto simpatiantaj nacilingvaj verkistoj - tradukistoj.

Ni esperu /alioŭ ni ne povas fari/, ke la denove fondita EVA /Esperantlingva Verkista Asocio/ ne neglektos ĉi tiun literaturan terenon, fares ian kunordigan laboron, proponos tradukindajn verkojn, eĉ donos ideojn.

D-ro István NAGY

Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA



La jarraporto de la Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA por la jaro 1983 informas, ke aktivas la fakaj grupoj por agrokulturo, komputiko, aviado kaj radicomatoroj. Pluraj membroj kunlaboras unuope en internaciaj laborgrupoj /ĥemio, fiziko, matematiko, k.a./.

Membroj de la sekcio aktive partoprenis plurajn aranĝojn: IFER LEIPZIG, Interkomputo 82 BUDAPEŬTO, Seminario en KARLOVO, Komputista seminario en ŽILINA, UK en BUDAPEŬTO.

En 1983 aperis Komputista vortaro de ing. CARAK; preparataj estas pluraj vortaroj - botanikaj, jura, matematika, aeronautika, duonkonduktila, akustika, gis-faka, elektroteĥnika, agrokultura.

Dum la jaro 1983 membroj de la Sekcio publikigis plurajn fakajn artikolojn en E.-periodaĵoj, konsulte aŭ redakte kunlaboris en eldono de eksterlandaj publikaĵoj.

Vigla kunlaboro kun alian-daj scienc-teĥnikaj grupoj, precipe en socialismaj landoj /GDR, Sovet-Unio, Kubo, Hungario/ realigas per interŝanĝado de publikaĵoj, en terminologia sfero kaj en solvado de konkretaj problemoj /novaj labormetodoj, esploro pri kanukero/. Tre grava estis ankaŭ informa agado, precipe por neesperantistaj medioj /ing. CHRDLÉ en Věda a život, en la radio/.

Menciinde estas ankaŭ ekfunkciado de faka biblioteko, komenco de E.-kurso por komputistoj, preparo de Legolibro por komputado ktp.

el fervoja movado

KIOM DA FERVOJSTACIOJ ESTAS EN MOSKVO?

MOSKVO - le ĉefurbo de Sovetunio estas la plej grava fervojnodo en la tuta lando. Ĉiutage ĉi tien alveturas kaj forveturas al ĉiuj landoanguloj proksimume mil kvincent trajnojn. Eksprestrajnoj kun ekzotikaj nomoj kiel TURKMENUJO, POLUSA LUMO, AMIKECO aŭ TRANS-SIBERIA EKSPRESO.

Sed kiom da fervojstacioj estas en Moskvo? Tiun ĉi demandon mi decidis respondi en

unu el ili - LENINGRADA. Kaj ĉar mi havis la tutan tagon liberan antaŭ forveturo de mia trajno, mi decidis la tempon por viziti ĉiujn moskvajn ŝtacidomojn kaj ekscii pri ĉiuj iom da informoj.

Mi komencis en LENINGRADA fervojstacio. Ĝi estas la plej malnova. Oni konstruis ĝin en la jaro 1851 kaj tiam ĝi nomis "MOSKVA STACIDOMO". Tio estis en tempo, kiam oni komencis la trafikon sur fervojlinio Moskvo - Peterburgo. Kiel diras

jam la nomo, temas pri kunligo de la du plej grandaj sovetuniaj urboj. Lau horaro oni povas eksci, ke de tie ĉi oni eblas vojaĝi ankaŭ al Murmansk, Novgorod, Pskov aŭ Tallin. **LENINGRADA** stacidomo estas konstruita sur iama Kalaŝerska kampo - nuntempa Komsomola placo, kiun oni ofte alinomas la placo de la tri stacidomoj, ĉar tuj vidalvide **LENINGRADSKA** stacidomo troviĝas **KAZANA** stacidomo, kiu bonodoras per varmaj malproksimaj lokoj de Turkmenujo, per historiaj urboj de Soveta Meza Azio, sed ankaŭ per industria Tjumeno, Omsk aŭ Krasnodar.

La plej pitoreska kaj **PLEJ MALPROKSIMA** estas la tria fervojstacio sur Komsomola placo - **JAROSLAVA**. Pekino, Ulanbatoro, Arĥangelsko, Vladivostok, Krasnojarsko. El tiu ĉi stacidomo forveturas eksprestrajnoj de Transsiberia ĉefa fervojo al Naĥodka tra plej longa fervojlinio en la mondo longa 8.000 km. Septaga veturo per trajno, precize 168 horojn. La fervojlinio kunligas la ĉefurbon kun ondoj kaj dispartigitaj marbordo de Pacifika Oceano.

Alia eksprestrajno **DUKLA**, forveturanta ĉiutage antaŭvespere, kunligas Moskon kun Prago. Eksprestrajno forveturas el **KIEVA** stacidomo sur la samnoma placo tra Ukraina SSR, ĉop kaj Ĉierna apud Tiso, **KIEVAN** stacidomon oni ankaŭ alinomas **STACIDOMO DE FERIAĜOJ**, ĉar ĉi tie oni eblas vidi plej multajn turistojn portantaj kofrojn kaj tornistrojn kaj veturontaj por sunumado al Budapeŝto, Beogrado, Sofio, Kiev aŭ Odeso.

Veturi al Prago oni eblas ankaŭ el **BLANKRUSA** stacidomo per eksprestrajno trafikanta tra Minsk, Brest, Terespol kaj Varsovio al Prago. **BLANKRUSA** stacidomo apartenas al la plej belaj kaj plej modernaj. Ĝi es-

tis konstruita en 1871 kaj ĝi estas la dua plej malnova. Oni konstruis ĝin okaze de ektrafiko ebliganta rektan kunligon de Moskvo kun Varsovio. La fervojstacio estis rekonstruita en 1912. Antaŭ du jaroj oni finis pluan parton de rekonstruado kaj nuntempe ĝi havas iujn plej modernajn aranĝojn kun supervideblaj, renverseblaj horaroj, perfekta ĉiutempa informejo, kelkaj bufedoj kaj restoracioj kaj moveblaj ŝtuparoj. Tiu ĉi **OKIDENTA** stacidomo, kiel oni ofte alinomas ĝin, estas konstruita sur Leningrada Avenuo kaj ĝi havas rektan kunligon kun Berlino, Barizo, Minsk, Varsovio, Prago kaj ĝin ĉebaltaj respublikoj kaj ŝtatoj.

En Ĉkalova strato troviĝas **KURSKA** stacidomo - unu el tri plej grandaj. De tie forveturas eksprestrajnoj al Adler, Bako, Teherano, Sebastopolo, Tbilisi, Erevano, Permo .. El tiu ĉi fervojstacio forveturas ankaŭ plej multaj pasaĝeroj.

Al ĉebalta Rigo oni eblas vojaĝi el **RIGA** stacidomo /sur samnoma placo/ kaj de tie daŭrigi per aliaj trajnoj al nordaj respublikoj. En la jaro 1900 oni konstruis Saratovan stacidomon /nuntempa **PAVELECKA**/. Ĝi kunligas Moskon kun signifa saratova regiono kaj kun aliaj regionoj apud Volgo kaj Dono. Ĝi ludis gravan rolon en historio. En la jaro 1917 la rugaj gvardioj ĉi tie arestis blankgardianojn kaj la 23-an de januaro 1924 ĉi tien alveturis funebra trajno kun korpo de V. I. Lenin.

SAVJOLOVA stacidomo sur Batory-placo estas konstruita inter Riga kaj Blankrusa stacidomoj. Ĝi apartenas al la plej malgrandaj kaj ebligas kunligon kun Leningrad, Rybinsk, k. t.p.

Ĉiu el niaj Moskvaĵoj stacidomoj havas sian historion, sian specifon. Ĉiujn oni eblas facile atingi per regulaĵoj autobusaj linioj aŭ per metroo. Neniam oni fermas dum la nokto. Ĉiuj servas al pasaĝeroj dum la tuta tagnokto.

Trajnoj alveturas kaj forveturas en kelkminutaj intervaloj kaj kiel oni mem povas konvinkigi - ili alveturas kaj forveturas akurate. Ankaŭ mia rapidtrajno al Prago forveturis akurate.

Jindřich TOMÍŠEK

TURISMA MONDO



INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO

ISEU 84-07-23-29, Veliko Tarnovo, Bulgario okazos duafoje en tiu romantika kaj pitoreska urbo. Celoj: altigi la generalan kaj lingvan kulturon, krei personajn kontaktojn kaj amikajn sentojn trans la limoj, eduki pacamon kaj humanismon. Samtempe altigi la aŭtoritaton de Esperanto.

Popularajn prelegojn el esperantologio, interlingvistiko, metodiko, juro, medicino, literaturo, arto ktp. faros prof. d-ro Istvan SZERDAHELYI, Hungario, prof. d-ro Stojan ĜUĜEV, Bulgario, voprezidanto de la Akademio de Esperanto, la kandidato de juraj sciencoj Maria PONTIKA, Greklando, docento Vladimir LEMBELEV, Sovetunio, Emilia LAPENNA, Jugoslavio, Belka BELEVA el la Supera Teatra Instituto de Sofio, prof. Kiril POPOV el Sofio, k.a.

Loĝado, manĝado - en studentaj hejmoj por Kĉs 800, --- Antaŭtagmeze - prelegoj, diskutoj, posttagmeze - ekskursoj, vespere-filmprezentoj, amuzprogramoj - ĉio ĉi senpage.

Limtempo por aligo: 84-06-01. Petu aligilojn de Bulgara Esperantista Asocio, bul. Ĥr. Botev 97, 1303 SOFIO.

La partopreno en ISEU estas bonege kombinebla kun partopreno en la tujaj internaciaj E.-kursoj en montaro RODOPO, en la Internacia E.-kursejo /I. - 84-08-20 - pri tio aparte avertu letere/. Sed vi povas aligi kaj pagi tuj pere de ĈEA.

INVITO AL BICIKLADO DE JUNULARO

Turisma komisiono de ĈEA anonas ŝanĝon en devena programo. La tuta programo okazos /arangato E.-Asocio en Kulturligo de GDR, Jahnstrato 12, GDR-2000 NEUBRANDENBURG, GDR/inter 84-08-20 / 84-09-01 kaj konsistas el tri ĉefprogrameroj:

1. JET /Junulara E.-Tendaro/ sur la tendumejo LOISSIN / 0143/ por interkonatigi, 84-08-20-26. De tie ni multe ekskursos.
2. Bicikla migrado en tri etapoj /atentu la ŝanĝon/:

a/ 84-08-26 al ÜCKERMUNDE /tendumejo C 101/	70 km
b/ 84-08-27 al PRENZLAU /lernejo/	60 km
c/ 84-08-28 al THOMSDORF /tendumejo C 086/ ĉe SEFT	40 km
3. Partopreno en SEFT-84 /84-08-28/84-09-01/.

Por tiuj, kiuj ankoraŭ havas libertempon, ni aranĝas post-

tendumadon en **TEMPLIN** /30 km de Thomsdorf/. Se oni volas tion, bv. informi min antaŭe /adreso: Ronald SCHINDLER, organisanto, Wilhelm-Pieck-Strato 44, GDR - 8090 TEMPLIN, GDR/.

Kondiĉoj: propra bone funkcia biciklo, tendo /ankau eblos ope uzi unu tendon, sed tio bezonas interkonsenton kun mi/, dormosako kaj matraco.

Partoprenkotizoj Kős 30,--. Vi povas pagi pere de CEA.

INTERNACIAJ ESPERANTO-ARANĜOJ EN HUNGARIO EN 1984

84-06-29/07-06 EN G Y U L A 22-a SOMERA E.-UNIVERSITATO /SEU/

Internacia forumo de la sciencopopularigo esperantlingva. Prelegoj de eminentaj fakuloj, koncertoj, ekskursoj. La fortikaja banejo /varmeta/ estas paradizo de homoj ripozemaj. Aligdato: 84-05-31. Kotizo: en studenta hejmo Kős 990,-- , en hotelo Kős 1.495,--.

84-07-08/17 en ABALIGET-PÉCS 17-a INTERNACIA RENKONTO NATURAMIKA /IREN/

Somerumado en agrabla unuaranga kampadejo de pitoreska ripozejo Abaliget en la montaro MECSEK, vizitado en la 2000-jara urbo PÉCS kaj ĝia regiono. Ekskursojn, tendarfajron, lingvokursojn, lagan solenajon, hungaran folkloran vesperon, cifonan balon ktp. kun vera esperantista etoso ofertas la organizantoj. Aligdato: 84-06-15. Kotizoj: Kős 1.260,-- - 1.920,--.

84-08-05/17 en EGER SOMERA E.-LERNEJO /SELE '84/

Antaŭtagmezaj lingvokursoj gvidataj de eminentaj instruistoj de Esperanto. Agrablaj ekskursoj en bela ĉirkaŭaĵo de la urbo, vingustumado kreas agrablan somerumadon. Aligdato: 84-06-30. Kotizo /en studentaj hejmoj/: Kős 1.800,--.

84-08-02/11 en VESZPRÉM - TRADICIA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTAJ FAMILIOJ /TREF/

En bela historia urbo okazos prelegoj, "infanoj sin prezentag", ludoj, rajdado, biciklado, ekskursoj al lago Balatono. Aligdato: 84-04-15. Kotizo /rabaton guas infanoj - 100% kaj edzinoj - 20%/: Kős 1.500,--.

84-12-28/85-01-02 en BUDAPEŬTO 14-a VINTRA E.-FERIO /VEF/

Tradicia jarfina renkonto en la belega hungara ĉefurbo ofertas allogan programon: urborigardado, tuttaga ekskurso provincon, E.-seminario kaj la Internacia Silvestra Baló. Aligdato: 84-11-30. Kotizo /en studenta hejmo/: Kős 1.500,-- - Kős 1.650,--.

NATURAMIKA TENDARO '84

En la tempintervalo inter la 20-a de junio kaj 8-a de julio 1984 okazos naturamika tendaro en Hungario, en montaro MATRA. La tendaro daŭros o. 10 tagojn, kaj la partoprenantoj prizor-

gos sin mem, aŭskultos fakprelegojn pri naturprotektadaj, ekologiaj kaj forstaj temoj. En la programo estas multaj ekskursoj kaj interesaj laboroj, kiel ekz. mikroklimo-mezurado, semokolektado, ktp., laŭinterese.

La tendaro estos en arbaro en propraj, kunportitaj tendoj, kaj ni aĉetos komune la mangajojn en la najbaraj vilaĝoj. La necesa kuracista prizorgado estos solvita. Partoprenkotizo /gi inkluzivas nur organizaĵajn kostojn/: Kĉs 180,--.

Se vi ŝatas en bela medio, en la naturo sovaĝe tendumi, nepre aligu. Ni povas akcepti nur ĉ. 30 personojn. La aligilo enhavu vian nomon, sekson, naskiĝjaron, adreson, civitanecan k. intereson. Ĉiuj aligintoj ricevos respondon, la akceptitoj konfirmilon kaj bultenon. /Acepto dependas de aligvico./ Mi skribos al ĉiuj, kiuj ankoraŭ aligis el la sama distrikto, regiono aŭ lando, por ke ili povu kontaktigi, kaj ne devu ĉiuj opaj personoj unu tendon kunporti, ktp. Demandoj skribitaj en la aligilo respondatos en la konfirmilo. Aligadreso kaj organizanto: Rezső BAROSS, Balzac u.11, H-1136 BUDAPEŬTO, Hungario.

Ĉiujn hungarajn aranĝojn vi povas pagi en kronoj pere de ĈEA!

FERIADO EN M A L T O - MEZE DE MEDITERANE

Post la sukcesa Unua Turisma Semajno okazinta en la jaro 1981 ESPERANTO-SOCIETO /MALTA/ okazigos la DUAN INTERNACIAN TURISMAN SEMAJNON EN MALTO de la 4-a ĝis la 10-a de septembro 1984.

Por detalaĵ informoj, programoj kaj aligiloj, skribu tuj al ESPERANTO-SOCIETO /MALTA/, P.O. 142, VALLETTA, MALTA.

VI CERTE NE PENTOS DE VIA DECIDO VENI AL ALLOGA MALTO.

6-AJ TURISMAJ TAGOJ /TUTA/ EN ŽILINA okazontaj en la tagoj 13. 8. - 18.8.1984

Programo: 1 duontaga kaj 3 tuttagaj piedekskursoj, 1 tuttaga busekskurso, amuzvesperoj, bakdo de lardo, ĉiujare novaj ekskursdirektoj. Partoprenantoj vizitos VRÁTNÁ-VALON, ROKARON DE SULOŬ kaj aliajn lokojn en la ĉirkaŭaĵo de ŽILINA.

Organizaĵ informoj: La partoprenkotizo Kĉs 370,-- por eksterlandanoj kaj Kĉs 330,-- por enlandanoj inkluzivas loĝigon, /5 tranaktoj/, ekskursojn kaj organizaĵajn elspezojn. Ĉiu partoprenonto devas aligi al unu el 3 kategorioj de ekskursoj:

A: 15 - 20 km ekskursoj en tre malfacila montara regiono.

B: 10 - 15 km ekskursoj en malfacila montara regiono.

C: 5 - 8 km ekskursoj por pli maljunaj turistoj kaj gepatroj kun malgrandaj infanoj.

Ĉiu partoprenonto devos havi turismajn vestaĵojn, turismajn firmajn suojn, dorsosakon, pluvmantelon, ĉapon. Partoprenontoj loĝos en Studenta hejmo - H L I N Y V. Autobusoj de la stacidomo n-roj 12, 13, 16, 26 kaj 33. Lunde estos certigitaj informservoj de la stacidomo /apud INFORMEJO - INFORMÁCIE/ kaj en Studenta hejmo de la 4,30 horo ĝis 18,00 horo.

Aligilo validos nur post la pago de la partoprenkotizo per la postpagilo, kiun vi ricevos post via aligo. Eksterlandanoj pagos surloke. Aligilojn senda ĝis la 15-a de julio 1984 al la adresoj: Ladislav HANZEL, Třieda obrancov mieru 25, 010 01 Ž I L I N A , Ĉeĥoslovakio.

4-a RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN GDR EN DRESDEN

En la tempo de 28-a - 30-a 9.1984 en DRESDEN okazos la 4-a CENTRA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN KULTURLIGO DE GDR.

Oni atendas ĉ. 200 esperantistojn. La kadra programo inkluzivas: kulturalan vesperon, ĵazkoncerton, prelegojn pri aktualaj sciencaj kaj Esperanto-fakaj problemoj, generalajn diskutojn kaj aliajn renkontiĝojn.



Eksterlandanoj el socialismaj landoj povas partopreni proprakte.

La kotizo de Kōs 380,-- inkluzivas tranoktojn de vendredo al dimanĉo, vespermanĝon vendrede, tag- kaj vespermanĝon sabate, tagmanĝon dimanĉe.

Aligilojn oni petu ĉe: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, 1080 BERLIN, Charlottenstr. 60, GDR, ĝis la 30-a de junio 1984.

Eblas pagi pere de nia asocio.

ni recenzas

Eduard VILDE: LAKTISTO DE MÄEKÜLA. El la estona tradukis Valer Kruusalu. Ilustris Heldur Laretei. Eldonis Eesti Raamat - 1983. 256 paĝoj, formato 16,5 x 13 cm, prezo Kōs 15,--.

La aŭtoro vivis 1865 - 1933 kaj la historieto okazas eble antaŭ cent jaroj. Pluraj dekoj da paĝoj estas komence dediĉitaj al priskribo pri aspekto, vivmedio kaj moroj de olda fraŭlo Ulrich von Kremer, bienposedanto en la norda Estonio. Iun tagon promenante, li ekvidas novedzinon de sia laboristo Tõnu Prillup, kiu vidigis nur antaŭ unu monato. Kaj tiel kreiĝas gea triangulo.

Leganto sekvas atentokapte la okazaĵojn, en kiujn implikiĝas la agantaj personoj. Profito, monavideco kaj deziro pri virino cefrolas ĉi tie. Do nenio eksterordinara, sed la tiea kaj tiama vilaga vivmaniero estas specifa. La aŭtoro ne evitas ironion, kiam etmorala homo predikas pri moraleco al juna vilaga viro. Kaj fine unu el la triangulo tragike mortas. La du restintaj personoj ne tro tristigas pro tio, sed ili ne kuniĝas. Ili ambaŭ ekiras alidirektajn vojojn, malgraŭ ke unu proponas kunigon.

La libro estas interesa legaĵo, lingve tre bona, rekomendinda, nur kun kelkaj prezeraroj. Ankaŭ ĝi estas bele presita sur bona papero kaj fortike kunkudrita.

Legante en la libro noton pri redaktado fare de Henrik SEPPIK, mi ne povas ne diri kelkajn vortojn pri tiu veterano, kiu fariĝis jam 79 jara ĉi jare. Li restadis en nia lando en 1936-1937, do nun certe vivas jam nur kelkaj el tiuj samideanoj, kiuj tiam povis konatiĝi kun li. Mi memoras, ke li lernis nian popolkanton kaj dum premenadoj sur vilagaj padoj kantis: "Huja, huja, hujaja, teĉe voda kalná..." Li akceptu korajn salutojn kaj gratulojn pro sia bona poresperanta laboro en la Estona SSR.

Adolf STANURA

Jantaĵ KAVALOV: LA RODOPA FALKO. Tradukis Ivan Kovačev. Rakonto pri la vivo de Dičo Petrov. Eldonis Bulgara Esperantista Asocio, Centra Estraro, 1984. Kajero 48-paga, formato 14 x 20 cm, prezo ne indikita.

Al biografioj de gloraj bulgaraj liberec-batalantoj, kiel Ĥristo Botev, Vasil Levski, Georgi Dimitroŭ kaj aliaj, kiujn ni ekkonis per eldonaĵoj de BEA kaj el la pagoj de Nuntempa Bulgario, aldonigas ĵen la vivpriskribo de brava bulgara heroo Dičo Petrov.

Desur la portreto alrigardas nin impona juna viro, oficiro, kiu nur 25-jara oferis ĝian vivon la 23-an de majo 1944 en partizanaĵ bataloj kontraŭ la germanajn okupaciantojn kaj iliajn bulgarajn monarko-faŝistajn vasalojn. Kun admiro kaj aprezo oni legas pri la dangeraj suferigaĵ traontaraj marsoj en frosto, negoŝtormoj, super minacaj abismoj kaj pereigaĵ lavangoj, sen nutraĵoj kaj ripozebloj. Tiel tiam batalis flank' ĉe flanko bravaj kontraŭfasistaj partizanoj jugoslavaĵ, bulgaraĵ, grekaĵ kaj albanaĵ en la balkanaĵ montaroj. Inter ili la Rodopa Falko - bulgara instruisto Dičo Petrov lau sia modelo Ĥristo Botev, kies nomon ankau portis la de li komandita bataliono. La leginda libreto estas lingve bonnivela. La 18 trovitaĵn era-rojn au preserarojn mi pretas laudezire soligi al la tradukinto au eldoninto.

Jiří KOŘÍNEK

el leterkesto



D-ro István NAGY
Szabó Ilonka u. 31
1015 BUDAPEŝTO
Hungario

Budapeŝto, 84.02.28.

Estimata Redakta Komitato,
surprize kaj ĝoje mi legis en STARTO 6/83 mian leteron pri la recenzo de KRÚDY: LA RO-ZO DE L' SULTANO. Malofte okazas, ke la kompatinda tradukinto povas diri sian opinion en la sama gazeto post la apero de la recenzo. W.AULD, def-redaktoro de beletra revuo FONTO, skribis al mi, ke mia longa artikolo pri la tradukado aperos en la januara /40-a n-ro/ FONTO. Mi skribis ankaŭ pri tio. Ĉi-momente transdonis ĝin la leterportisto.

Eble vi povas uzi mian artikolon en via gazeto pri ES-PERANTO KIEL FONTO-LINGVO. Mi petas vin, se ĝi ne estos aperigita, bv. resendi ĝin al mi /anticipan dankon/, ĉar tiam mi transdonos ĝin al BUDAPEŝTA INFORMILO au al FONTO, iome sangita.

Mi legas STARTO-n, ĉar mi ĝin ricevas de BUDAPEŝTA INFORMILO kiel honorarion por la artikoloj, poste ĝin konservas kaj gardas s-ano Károly FAJSZI en sia granda biblioteko, kiu estas protektata de la ŝtato.

Sinceraĵn salutojn via
d-ro István NAGY

Loka grupo de ĈEA
Esperanto-klubo NÁCHOD.

Náchod, 84.01.30.

Vážení přátelé, esperantisté,
v čísle 5/83 STARTO jsme si
mohli přečíst skromné oznámení,
že z našich řad odešel
dlouholetý esperantista MUDr.
Josef ČERNÝ, který na sklonku
svého života byl členem esperantského klubu v Náchodě.

Jeho pobyt mezi námi byl vlastně již odpočinkem po jeho celoživotní usilovné práci pro naše esperantské hnutí. Sestavit ze střípků poznatků souvislou mozaiku o jeho životě a díle je úkolem všech jeho přátel. Proto žádáme esperantisty v ČSSR, zejména pak přátele v Bratislavě, Litoměřicích, v Mostu a Plzni, aby nám svými poznatky o MUDr. Josefu ČERNÉM pomohli. Nejde nám o to sestavit zlatý rámeček kolem jeho jména, ale získat uznání jeho celoživotnímu úsilí ve prospěch naší společné věci.

Zároveň prosíme, pokud někdo zná další údaje o bratřích Karlu a Janu FILIPOVÝCH, autorech Velkého slovníku esperantsko-českého /1.vydání v r.1930 a druhé v Přerově, 1947/ a česko-esperantského /Přerov, 1949/, údaje, které nebyly dosud nikde uvedeny, aby nás s nimi seznámil.

Pište prosím co nejdříve na adresu: Karel STROUHA, ul. Kamenice 114, 547 01 NÁCHOD, ČSSR.

Resumo: Karolo STROUHA /lia adreso estas pli supre/ seroas precizajn informojn pri vivo, E.-aktiveco kaj pluajn sciigojn, nome postlasitajn dokumentojn, leterojn, k.t.p. de la ĉefaj signifoplenaj esperantistoj MUDr. Jozefo ČERNÝ kaj fratoj Johano kaj Karolo FILIP.

Nguyễn DŨ KHÁNH
173 A Vo Van Tan
Hố Chí Minh
VJETHAMA SOC. RESPUBLIKO

Sendependeco-Libereco-Feliĉe.

Al ĉefredaktoro de STARTO.

Tre estimataj gesamideanoj,
ni ĝoje sendas al vi la artikolon SOLENA ESPERANTA VESPERO EN VJETHAMA SOCIALISMA RESPUBLIKO dankante vin pro viaj helpoj.

Kun tutkoraj salutoj el batalanta Vjetnamio via kunlaboranto kaj leganto

N. D. KHÁNH
HoChiMinh, 83.12.26.

SOLENA VESPERO EN VSR

La 15-an de decembro en la Domo de Kulturo en HoChiMinh okazis solena E.-vespero. Ĉeestis kamaradoj: Nguyễn Đức Quý, vicprezidanto, Nguyễn HAI TRŨNG, Nguyễn MINH KINH, centraj komitatanoj de Vjetnama Paedofenda E-Asocio, gesperantistoj, gelnantoj de E.-kursoj, gastoj de diversaj oficoj, fakoj. La renkontigo estis malfermita per Kant-muzika programo de Nhà Văn Hóa. Komence, ni audis rememorojn pri UNUAJ TAGOJ DE LA FONDIGO DE VPEA - 1956, 12. 09. Parolis nia veterano NG MINH KINH kaj ripetis brilajn ekzemplojn de nia forpasinta E.-prezidanto Nguyễn Văn KINH por revolucioj kaj E.-aktivuloj, pri Vjetnamaj esperantajoj kaj monda opinio. Interesan raporton pri la vivo kaj agado de D-ro L. ZAMENHOF, kaj ankaŭ pri la rolo kaj signifo de ESPERANTO kiun ekzistas jam 96 jarojn, UEA 75 j. kaj MEM 30 j., legis s-ano Nguyễn DŨ KHÁNH. Kvin kantoj en ESP. plenumis gelnantoj el la E.-klasoj sub la gvido de la instruisto Phan Duc THANH. La

partoprenantoj trarigardis kurtiman ricehavan E.-ekspozicion kun multo da presaĵoj de Vjetnamio, mondo, fotoj kaj korespondadoj.

Oni invitis kunvenantojn trinki teon, manĝi kukon kaj bombonojn por Novjaro 1984. La nove fondita E.-klubo/82.04.15.

en HoChiMinh/ komencis la plenumon de sia ampleksa programo por propagando de Esperanto en la urbo. La publiko varme aplaudis la plenumantojn. Ni solenis vere bonan ZAMENHOFAN feston.

N. D. KHÁNH

RONDETA VIVO

B R N O

Dum la tuta jaro, en ĉiu kluba kunveno, okazas paroladoj kaj altnivelaj prelegoj kun natursciencaj, literaturaj, geografiaj k.a. temoj. Tamen de temp' al tempo la klubo aranĝas artvesperojn, certagrade unikajn. Tia estis la 14.2.

GLORAJ MONOLOGOJ de Eva SEEMANOVÁ, kiu mirigis la ĉeestantojn per fenomenema memoro kaj prezento, kiel deklama tiel aktora.

Digna soleno de la Internacia Tago de Virinoj /la 6. 3./ estis vespero kun poeto J. KAREN, poeto ZD. SPILKA kaj komponisto D. SPILKA. Estis prezentitaj poemoj el la ama poezio de ambaŭ poetoj, teneraj kaj ardaĵ, kun pianoakompano de D. SPILKA.

Kaj la solena koncerto omaĝe al la Jaro de la ĉeĥa muziko la 20.3.1984 estis glora, solena kaj tamen amika. Gyidis kaj kantis H. SUPOVÁ-HALIČOVÁ, melodramon de FIBICH prezentis prof. A. RUŽIČKOVÁ - PAVLÍNOVÁ kun pianoakompano de prof. D. ZAORÁLKOVÁ, koncertis violonvirtuozo JAKUBEC, prezentinte famajn kaj brilajn komponaĵojn, kantis operkantistino SURYOVÁ, krome du tre esperplenaj artistoj kantis kaj pianoludis. Ĉe ĉiuj arangoj granda vizito, ple-

na salono, regis grandega entuziasmo.

La 6.3.1984 estis komencita nova kvarmonata kurso por komencantoj. Partoprenas 25 personoj kaj unu kubano. Parolis kaj instruas J. VONDROUŠEK. La kurso por progresintoj daŭre kontinuas, gvidas ĝin ankaŭ la prezidanto.

-jv-

H A V Í Ř O V

La membraro aprobis la ĝisnunan komitaton dum la januara jarkunveno. En februaro prelegis Jarmila PASTRŇÁKOVÁ pri sia partopreno ĉe la UK en BUDAPESTO. La 8-an de marto ni festis la Internacian Virinan Tagon. Prelegis kaj poemojn recitis M. PASTRŇÁK kaj J. PASTRŇÁKOVÁ. La ĉeestantoj ricevis donacetojn kaj la vespero finiĝis per komuna kantado, kiun per gitaro akompanis Zdeněk HEISER.

HAVÍŘOV ĝemeligiĝis kun la angla urbo HARLOW. Ni sukcesis ekligi kontakton kun tieaj esperantistoj kaj informis pri tio nian Naŝian komitaton. La ĝemeligo espereble bone disvolvos, ĉar en HARLOW vivas polino, edzino de tiea s-ano Eric TIDY.

-AST-

P R A G O

La 20-an de februaro okazis jarkunveno de la Esperantista Klubo en PRAGO. Estis elektita nova komitato, kiu diferencas

de la antaŭa. Nova prezidanto de la klubo fariĝis s-ano Helena ŠTRUMCOVÁ, vicprezidanto estas s-ano Jindřich OEDRÁČEK, sekretario s-ano Stanislava KNÍČHALOVÁ. Oni dankis al la malnova komitato por la laboro kaj al la nova komitato oni deziras konstantan prosperon en la laboro.

Inter la Esperantista Klubo en PRAGO kaj la Urba Pac-Kon-silantaro en PRAGO estis interkonsentita kunlaboro. La prezidantino de la klubo fariĝis membro de la Urba Pac-Kon-silantaro.

-tera-

PROSTĚJOV

Loka grupo aranĝis la 15-an de februaro VESPERON DE GLORAJ MONOLOGOJ kun konata aktorino Eva ŠEEMANNOVÁ. Multfoje ap-laudis ĉeestantoj al sia elstara deklamado. Per gitarmuziko plenumis programon instru-isto de Popola muziklernejo V. ZAPLETAL. Inter ĉeestantoj estis ankaŭ delegitoj de L G -oj el OLOMOUC kaj PREROV.

-tom-

PREROV

La jarkunveno de Esperanto-Klubo PAĜDEFENDANTOJ ĉe UK Pře-rova Masinfabrika en PREROV okazis la 26-an de januaro 1984. Kiel honoraj gastoj partoprenis kamaradino Marie ŠCHONWEITZOVÁ, direktorino UK Pře-rova Masinfabrika kaj elstara esperantista aktorino el PRAGO Eva ŠEEMANNOVÁ.

Priagadan raporton de unu el la plej malnovaj landaj E-kluboĵ faris ties prezidanto Ludvík CHYTIĻ. La klubo havas 42 membrojn kaj ĝi prizorgas E-instruadon de 10 pioniroj el klubo de Internacia Amikeco en PREROV. Krome funkcias du kursoj en E-klubo, tiu por komen-cantoj kaj progresantoj.

Estis organizataj multaj preleĝoj ne nur en E-klubo, sed ankaŭ por neesperantistoj en diverĝaj lokoj en PREROV kaj ĉirkaŭaj vilaĝoj.

Okazis solena kunveno okaze de sesdekjara jubileo de la E-Klubo kun interesa kultura pro-gramo. La klubo organizis Eks-pozicion de infanpentraĵoj el kvin kontinentoj inter 20.12.1983 - 15.1.1984, kiun vizitis pli ol 2.500 spektantoj. Estis ekspoziciataj pli ol sescent pentraĵoj de infanoj el 35 landoj kun plejmulte pacaĵ te-moj.

Por solena atmosfero de la jarkunveno grave kontribuis la konata aktorino el PRAGO Eva ŠEEMANNOVÁ, kiu prezentis sur improvizita scenejo al la dan-kema publiko kelkajn famajn monologojn.

Post salutvortoj far repre-zentantoj de la najbaraĵ E-kluboĵ en diskuto estis esprimita kontentigo de la realigitaj iniciatoj kaj estis fari-taj rekomendoj pri la estonto.

-jt-

MLÁDÁ BOLESLAV

Favorantoj de Esperanto sukoesis kunvoki en la Kulturan domon kunvenon de esperantis-toj la 12-an de marto 1984. Ĉe-estis 15 gesamideanoj. D-ro Jozefo HRADIL el MNICHOVO HRA-DISTĚ raportis pri Universala Kongreso de Esperanto 1983 en BUDAPEŠTO kaj pri santempa sta-to de nia movado.

Fondigis trimembra komitato, kiun gvidas Karolo GLEISNER k. Zbyněk JOMÁŠ kun Milan POLIN-SKÝ. Estis starigita la labor-plano por tiu ĉi jaro. La gvi-dantaro de la Kultura domo pro-mesis plenan subtenon por la refondiginta rondeto.

MNICHOVO HRADIŠ-TĚ

La 5-a printempa seminario

okazos en TESLA refrigiĝejo en BOROVICE /7km norde de Mnicho-vo Hradiště/ en novkonstruita luksa hotelo kun varmakva bazo /84. 05 18-20/. Instrua programo 10 h., ekskursoj, kultura programo, logado, mangado, eks-terordinare favora prezo 139,- Kĉs. Aligu tuj.

P Ĥ Í B R A M

Ai nia E-rondeto, organizita ĉe Sindikata Kultur-domo de Uranminejoj en PĤÍBRAM, estis destinita honora titolo DEFENDANTOJ DE LA PACO. Ni tion meritis ĉefe pro daŭriga poezia ciklo, kies nomo PER ARTO KONTRAŬ MILITO, jam estiĝas konata en la urbo PĤÍBRAM. Dum solena vespero aktorin Eva SEEMANOVÁ kun recitado de FAMAJ MONOLOGOJ, sed krom tio - kontraŭmilitaj monologoj el Bertolt BRECHT kaj Jiří MAREK.

Nelonge post ĉi menciita vespero ni okazigis alian. Animo de ĉi afero estas nia amiko, poeto Jiří KAREK. Ĉiĉfoje li alvenigis verkiston Lubomír TOMEK, kaj kun aktoro el Teatro PĤíbram, Emil KAVAN, ili formis triopon, kiu sciis instigilnian seivolemon dum tri vesperaj horoj.

Kun granda intereso renkontiĝas niaj prelegoj kun koloraj lumbildoj je turismaj temoj.

Urbanoj jam kutimiĝis, ke en nia vitrokasto ofte aperadas io nova el esperanta mondo. Ĉu antaŭ la okazo, ĉu post la okazo, ni informas legantaron en la regionaj gazetoj KAHAN, NOVĤ PĤÍBRAMSKO aŭ ATOM.

Do ni instigas ankaŭ vin - ne forgesu je bona propagando. Ĉi estas duono da sukceso.

-tur-



Per ĉiuj 25 vortoj vi pagas 15 Kĉs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Monika KORMOUTOVÁ, SUDISLAV 52, 561 12 BRANĤYS N. ORLICĤ, Ĉeĥoslovakio, 17-jara, interesigas pri historio, musiko, filmoj k. velas intera. PM, gramofondiskojn, suvenirojn.

Jaroslav ŤTEPEK, Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Jilská 10, 110 00

PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio, pensiulo, dez.kor.kun samideaninoj.

Esperanto-klubo VELO, sekcie LETERAMIKO, 443020 KUJBIŤEV - 20, a/d 885, USSR, dez.kor. kun iu el kluboj de ĈSSR.

Barsi IBOLYA, bibliotekistino, 2162 ŬRBOTTYAN, Rákóczi 22, Hungario, dez.kor. kun kia ajn aĝa praga esperantistino.

Peter VDOVICA, ĵurnalisto, str. Parĥomenko 27, 349980 PO-PASHAJA - 4 /Voroŝilovgrad.obl. USSR, dez.kor., kol. EK, PM, insignojn, flagojn, fotojn de aktorinoj, emblemojn, monetojn, musikajajn, E.-librojn k. librojn por infanej.

VERKOJ DE P.POLISĤUK SERĤATAJ! Uzbekiaj E.-aktivuloj Mopodas ordigi k. kompletigi per eventuala eldono la kreaĥ heredaĵon de vaste konata tas-kenta esperantisto Petro POLI-

ŜUK. Tiucele estas cerĉataj ĉiuj liaj originalaj kaj tradukitaj verkoj, dissemitaj tra E.-gazetaro kaj privataj leteroj. Ni petas la tutmondan esperantistaron kaj ĉiujn leteramikojn de P. POLIŜUK, reŝi kaj sendi originalojn aŭ kopiojn de liaj verkoj kaj korespondaĵoj al la adreso de la prizorganto: Vladimír MASAL-KIN, massiv Junusabad, kvartalo 8, dom 13, kv. 28, 700098 TAŠ-KENT - 93, Uzbekistano, USSR.

Bernd MANN, Baunaokoh.3, GDR 7024 LEIPZIG, 26 jara elektroteknika faklaboristo dez.kor.tutmonde pri turismo, muziko, teatro kaj botaniko.

Gintaras ŽIAUNYS, Žemaitijos 9 - 25, 235500 MAŽEKIAI, Lito-
vio, USSR, 18-jara, dez.kor.t.
n. kaj interes.PM, BK, diskojn k.
esperantaĵojn.

Lázaro HERNANDEZ, Av 69
12806 ./ 128y128B, Marianao 15,
HAVANO, Kubo, 20 jara universitata
studento, dez.kor. kaj
interes. librojn, revuojn, son-
diskojn.

Komence de januaro 1984 en la urbo URGENC /Uzbekistano - USSR/ laŭ dekreto de la urba komсомola komitato estis fondita Esperanto-klubo se la fervojstacia oficejo. Aktivuloj de la nova esperanto-kolektivo deziras starigi leterkontaktojn kun gsesperantistoj de la tuta mondo. Viajn leterojn sendu al la adreso:
ESPERANTO-KLUBO ESPERO, Ĥasanov ROZUMBAJ, Do vostrebovania, 740001 URGENC - 1, Uzbekistan, USSR. Respondo estas garantiata.

Eva Zimmermannová, Frýdneva 5
CS - 582 81 Hebrý, deziras interŝangi PM, BK, Kalendaretojn
Ŝi estas 10-jaraĝa komencantino en Esperanto.

17-jara studentino kun ĉiuj lendoj. Iva Vargová, Zápotoc-
káho 1059/21, CS-410 02 LOVO -
SICE.

Marta Kutálková, Zahradní 5197
CS 430 04 CHOMUTOV, deziras
korespondi tutmonde.

Petr Kučera, Jabloňová 78, CS 106-
00 Preha 10, deziras korespondi
kun geemikoj tutmonde.

Alena Winterová, CS 542 33 Rtvně
v Podkrkonoší 586, deziras kores-
pondi internacie.

Mi volas korespondi kun vi ! Mi estas 26-jaraĝa. Interesas min la muziko, filmoj, teatro. Mi volonte interŝengos suvenirojn. Skribu al Emilie Šimunová, Thälmanová 2332, CS-955 01 TPOPCANY .

D O M A G O J

Mikaláš ČEKAL, Džefín, 30, --
Kčs Jar. TÁBORSKÁ, Česká
Budějovice 195, -- Kčs, LG Ja-
blonec 350, --Kčs, LG Teplice
25,50 Kčs, Losmanová, Praha 35, -
Koran dankon al vi ĉiuj.

A N O N C O J

La Klubo de Interpopola Amikeco JUNECO de la taŝkenta mezgrada lernejo N 34 aŭtune 1985 organizos la ekspozicion LA MONDO EN BILDKARTOJ, por kiu estas kolektataj ĉiulandaj bildkartoj pri la temoj: vidindaĵoj, naturo, popolaĵ kutimoj, naciaj kostumoj, arto, kulturo, muzeoj, junularo, infanoj, sporto, aŭtoj, faŭno, floroj kaj aliaj. Estas atendataj ankaŭ esperantlingvaj skizaj rakontoj pri popolaĵ kutimoj, moroj, naciaj festoj, historio de monumentoj.

Krome estas serĉataj landaj flagetoj kaj urbaĵ blazonoj. Ni

Eks-studento de la universitatoj de Toronto /Kanado/, Michigan /Usono/, Paris /Francujo/ kaj Cambridge /Britujo/, YALDEN doktoriĝis pri filozofio, studis la rusan lingvon kaj laboris interalie en Moskvo, Parizo kaj Genevo. Li multe okupiĝis profesie pri malmalrado kaj edukado.

Ĝis la mezo de marto aliĝis 531 kongresanoj el 48 landoj. En la unua loko estas Usono, de kie venas kvarono de la ĝisnunaj kongresanoj. La postajn lokojn okupas Kanado, Francujo, Britujo, Nederlando kaj FR Germanio. Estas notiĝe, ke estas tiom multe da aliĝoj el Brazilo, Hungario kaj Aŭstralio, kiom el Italio kaj, ke el Bulgario estas nur 2 aliĝoj malpli ol el Belgio. Aliaj menciindaj landoj estas Japanio kaj Svedio, kiuj estas bone reprezentataj.

Adreso de LEK: 53 North Boundary, Vancouver B.C., Kanado - V5K 3S4.

IAHE - INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ FONDITA

Post tri jaroj de klopodoj, nun la pasintjara antuna Renkontigo /IV-a / de Slavonijaj Esperantistoj estis fondita Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj /IAHE/. Ĝia provizora estraro estas elektitaj por prezidanto Prof. D-ro Robert R. ROBERTSON /Aŭstralio/, por vicprezidantoj: Ing. Kenet R. JONES /Usono/, D-rino Lina GABRIELLI /Italio/, Nikolaj GRIŜIN, /Sovetunio/ kaj por sekretario Dušan ADNADJ /Jugoslavio/.

Ekde la jaro 1984 ekaperos gazeto VOĈO DE HANDIKAPULOJ kiu aperos 6 foje jare, sur granda formato, lukse presata. Abonprezo: 5 usonaj dolaroj, 12,-- glđ. aŭ egalvaloro. Redaktoroj de la nova gazeto estas elstaraj jugoslaviaj esperantistoj: Dušan ADNADJ kaj Vuĵadin LUKIĆ.

Ĝi invitas ĉiujn esperantistojn kaj neesperantistojn: helpa novan Asocion, aliĝu al ĝi kaj abonu novan gazeton. Por ĉio vi povas direkti sin al la adreso: VOĈO DE HANDIKAPULOJ, Skolska str. n-ro 25, 56227 - BOROVO, Jugoslavio.

NI LEGAS ANSTATAŬ VI SEN IA KOMENTO EL E.-GAZETOJ...

BUKUREŝTA INFORMILO N-RO 4 - 5

La revuo Esperanto de Universala Esperanto-Asocio n-ro 12 /1982/ aperigis artikolon koncernantan al Esperanto-movado en Rumanio. Ĉar la aŭtoro de ĉi artikolo klopodis relisfigi nur neajn flankojn de poresperanta agado en Rumanio, ĉi sube ni elmontras koncize la staton de tui-ĉi agado.

- La revuo NAPOKA UNIVERSITARA /Universitata Napoko/ publikigas esperanto-kurson por komencantoj ekde ĝia unua numero de 1983 pere de la zorgo de fervora esperantisto Adrian CRENGĂNIŜ.

- En la komenco de 1983-a jaro, estis fondita en urbo ROMAN, ESPERANTO-KLUBO MOLDAVIO enkadre de tiea Muniĉpa Biblioteko. La klubo organizas ankaŭ Esperanto-kursojn.

- Enkadre de INTERNACIA JARO DE LA KOMUNIKADO, esperantista fako de Filologia Societo de R.S. Rumanio la filio de Bucuresti je la 26-a de marto 1983 okazis simpozio kun la temo KOMUNIKADO. La dek unu sciencaj komunikaĵoj prezentitaj de Universitataj Profesoroj D-roj Cezar APREOTESKI, Ch. BULGAR, Gabriel TEPELEA k.a. estis aŭskultataj kun intereso de esperantistoj partoprenintaj el Bucuresti, Sibiu kaj Timiŝoara.

petas la tutmondan esperantis-
taron reĉfi kaj sendi ĉion al
la adreso:

Vladimir MASALKIN, 700093 TAS-
KENT - 93, massiv Junusabad,
kvartalo 8, domo 13, kv. 28, Uz-
bekistan, USSR.

Ĉiu kontribuonto ricevos
respondon kaj bildkartojn pri
Uzbekistanaĵoj urboj aŭ alian
rekompenson laŭ interkonsento.
Sinceraĵoj dankojn al ĉiuj hel-
pontoj.

- o - o - o -

Ni informas ĉiujn niajn gea-
mikojn, ke ni edziniĝis 01.03.
1984 en Vilnius - USSR.



Jenina kaj Zdenko Křimský

KRONIKO

La 27-an de majo festas si-
an kvindekajn naskiĝtagon, bone
konata aŭtoritatulo en nia Es-
peranto-movado, samideano ZDEN-
KO K R I M S K Ý en plena
sano kaj fervoro.

NI DEZIRAS AL LA PLEJ VIGLA
KAJ ENERGIA SEKRETARIO DE NIA
ASOCIO MULTE DA FORTO, PERSIS-
TO, LABORO KAJ TRANKVILLO POR
LA ENORMAJ TASKOJ, KIUJ ATEN-
DAS NIAJN ESPERANTISTARON EN LA
VENONTAJ JAROJ.

Ĉefa Esperanto-Asocio

Pro la ŝanĝo de la materialoj,
en la periodo kiam oni ŝanĝis
la redaktejon erare ne estis en
la Starto publikigita informo,
ke forpasis niajn vicajn membro
de LG Přerov, s-ano Jaroslav Ma-
záč. Li mortis post peza malse-
no 8. 12.1983 en ago 86 jaroj,
el kiuj li 70 jarojn laboris por
nia movado. Honoron al lia me-
moro.

La 19an de aprilo ĝisvivis 80
jarojn Jan Janda el Kolín, lon-
gjara entuziasma propagandisto
de Esperanto, honora membro de
nia asocio kaj eksestro de nia
LG en Kolín. Ni sincere desi-
ras multe da sano, sukcesojn,
kontentan vivon kaj bonejn no-
vajn travivaĵojn en la esperan-
tista medio.

LG Kolín
Estraro de ĈEA

INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

69-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN VANUVERO /KANADO/
84 07 21 - 28

La ĉefa gastparolanto dum la UK estos D-ro Max YALDEN, Mini-
stro-komisiito pri Oficialaj Lingvoj en Kanado. D-ro YALDEN es-
tas profesia diplomato, kiu pasigis 4 jarojn kiel vic-minist-
ro pri Komunikado /1973 - 1977/ antaŭ ol ricevis sian nunan po-
stemon por sepjara periodo.

- La kvina datreveno de la fondigo de KEI estis solene rememorigita en TIMIȘOARA je la 28-a de majo 1983 kun la partoprenado de geesperantistoj el Timișoara kaj Sibiu.
- Komence de universitata jaro 1983/84 en universitata centro CLUJ-NAPOCA estis fondita studenta Esperanto-klubo.
- La ministerio pri turismo eldonis jubilean numeron de la revuo ROMÂNIA PITOREASCĂ sub la titolo FERIOJ EN RUMANIO, kiu estis disdonita al ĉiuj partoprenintoj de la 68-a Universala Kongreso de Esperanto en BUDAPESTO en aŭgusto 1983.
- La 68-a UEA Kongreso en BUDAPESTO povas esti taksata kiel giganta Kongreso ĉar en ĝi partoprenis 5011 gekongresanoj el ĉiuj kontinentoj. Ankaŭ rumanaĵ esperantistoj partoprenis, sed neoficiale.
- La revuo FLACARA de 19-a de aŭgusto 1983, la revuo MAGAZIN kaj la revuo ROMANIA PITOREASCA /sept. 1983/ informis la legantojn pri la 68-a UEA Kongreso.
- En la revuo FORUM STUDENTESC, oktobro 1983, aperis intervjuon far de la studento Florin BOCIORT pri la derulado de la 68-a UEA Kongreso.
- La almanako de la revuo FLACARA por la jaro 1983 sur ĝia p. 287 entenas la artikolon ESPERANTO SAU DREPTUL UNEI IDEI LA ADEVĂR SI DEMNITATE. Bonege dokumentita ĝin subskribas prof. D-ro BOCIORT el Timișoara.
- La Bulteno de Universala Medicina Esperanto Asocio /UMEA/ eldonita de Bulgara Esperanto Asocio publikigas SCIENCAJN PRELEGOJN inter kiuj estas ankaŭ la prelego de d-ro Ion TEREȘNEU titolita ENKONDUKO EN LA STOMATOLOGIA-CIBERNETIKON.
- Ĉeĥoslovaka revuo SANO kaj la bulteno de bulgara Esperanto Fako de Medicinistoj per ĝia Bulteno SANINFORMOJ aperigis la biografion de D-ro Gabriel ROBIN, pioniro de la esperantista movado en Rumanio. Aŭtoro de ĉi biografio estas D-ro Lázár Gábor el Covasna, delegito de UMEA.
- Eldonejo ALBATROS, kolekto LYCEUM, aperigis INVENTICA de Pierre VERON. Sur la paĝo 257 oni povas legi: "kreita ankaŭ al la fino de 19-a jarcento, ĉi lingvo enkondukigis rapide je sukceson nekonatan ĝis ĝi: hodiaŭ en la tuta mondo agas miloj da rondoj esperantistaj, estas studata de multaj universitatoj, en Esperanto oni skribas sciencajn verkojn de universala cirkulado, literaraj verkoj kaj tradukoj el diversaj lingvoj".

ESPERANTA FINNLANDO /el la AGADRAPORTO 1983/

La ĉapitro MEMBRARO en la raporto ne estas konvena legaĵo. Ĝi montras malkreskon de 48 membroj /de 699 al 651/ kompare kun la jaro 1982. Kaj ankoraŭ: En la jaro 1981 la asocio nombris 721 membrojn, do en du jaroj okazis malkresko de 70 membroj. La membro-organizaĵoj nun havas 14, dek lokajn kaj kvar fakajn aŭ specialajn. Tiuĵ havis ĉe la jarfino 555 membrojn, do da individuaj membroj troviĝas nur 96 - kompare kun 136 en la jaro 1982 kaj 144 en 1981. Tio signifas gravan falon al la ekonomio kaj ankaŭ al la prestiĝo de EAF. En rubriko BUDĜETO POR 1984 estas skribita, ke la mecenatoj kovras pli ol 25% de ĉiuj elspezoj de la asocio. Same enspezoj, same kiel elspezoj, altiĝos 13.500 markojn finnaj. La membrotizoj /50 markojn - por la individua membreco/ pagas versajne nur 90 markoj. Ĉiuj aliaj estas t.n. kolektivaj membroj po 10 markoj jare.

DER ESPERANTIST

Ĝi aperas kun granda malfruigo /en fino de marto 1984 ni ricevis n-ron 5/83/, sed estas plena de interesaj informoj en bona Esperanto. En la sama numero ni trovis bone stilizitajn, enhavricajn artikolojn pri la Monda Asembleo por Paĝo kaj Vivo en Prago 1983, pri rezultoj de la 68-a UK en Budapeŝto, pri 5-a Kultura Festivalo en Opava, pri IMEK /Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco/ en Poprad kaj ankaŭ inviton al la 6-a Porpaĝa Renkontigo en Pardubice. Bedaurinde malmulte da homoj tiun ol gazeton ne ni legas. Tamen eblas mendi ĝin facile pere de Gazetara Servo.

VELO/Bulteno de Vojvodia Esperanto-Ligo en Subotnica/

Pri la 21-a Jugoslavia Esperanto Kongreso ĝi skribas: "...en SKOFJA LOKA okazis valoro kongreso, kaj, se efektivigos la decidoj /partoprenis ĉirkaŭ 300 ceestantoj/ de la kongreso, oni libere povas ĝin nomi historia. Historia, ĉar UNUAN FOJON estis nia nacia Esperanto-kongreso kunvokita laŭ la principoj de DELEGITA SISTEMO ..."

PRINTEMPA KUNSIDO DE LA ASOCIA CENTRA KOMITATO

okazis 7.04.1984. La komitatanoj akceptis gravejn decidojn. Inter ili estis traktita la jербуĝeton 1983 kaj ĝian rezulton. Oni konstatis ke kompare kun la jaro 1982:

- sumaj enspezoj malkreskis je la 70,20 %
- sumaj elspezoj kreskis je la120,00 %
- libroj je la stoko kreskis preskaŭ je 490.000 Kĉs/ pli pri la 55.000 Kĉs ol en jaro 1982 /.

Plejgranden elspezon, preskaŭ 291 000 Kĉs uzis asocio por la presado de la gazetoj kaj libroj/ kompare kun jaro 1982 je la 144,8 %/.

Oni traktis enkaŭ evolucio de la asociaj membroj. Kompare kun la jaro 1982 malkreskis la nombro de la membroj pri 3 personoj.



Venis 1 tero el Argentino:

→ S.O.S. ←

Estimatej semideanoj:

Kiel konate la institutoj por distavtigo de Esperanto barektas daŭre kontraŭ la fantomo de financoj.

ARGENTINA ESPERANTO-LERNEJO estas semprofitcela organizo por la instruado de Esperanto per korespondado en Argentino kaj Latinameriko.

Ni instruas per elementa kaj perfektiga kursoj kaj disponigas al la gelnantoj ekzempleroj de diversej internaciaj revuoj/ kune kun ĉiu leciono/, por ke ili praktiku kaj samtempe konatigu kun la Movado kaj integriĝu al ĝi. Krome ni havas malgrandan Cirkulantan Bibliotekon kiu pruntedonas librojn al la gelnantoj kaj eksgelnantoj, tial ke estas tre malfacile aĉeti librojn eksterlande pro la altega kosto danke al nia sen-

helta inflecio. Sed la lernantoj estas multaj kaj la libroj multaj. Ĉar ni alvenis al kriza momento en nia vivo, ni devas elekti: aŭ morti aŭ havi eksteran helpon.

NI PETAS VIN PRI MODESTA KONTRIPUO !!!

Laŭ via bontrovo sendu al nia adreso: Unu aŭ pli da Internaciaj respondekuponoj aŭ librojn, prospektojn en Esperanto. Ĉio helpas al ni.



Argentina Esperanto Lernejo
Casilla de Correo 278
2000 ROSARIO - Argentino

NI ALDONAS :

Kelke da miloj de bonaj libroj kuŝas en nia deponejo. Vi du - foje povas helpi, se vi aĉetos ilin: al gesamideanoj el Argentino kaj samtempe al propra asocio.

Ŝanĝo de la prezoj :

Erare estis anoncitej du prezoj en Starto 1/84. La asocia katalogo nun kostas nur 5,--Kĉs kaj la lernolibro por infanoj Esperanto II, eldonita far nia asocio kostas kun la labortekstoj 24,50 Kĉs. Ni petas pro via pardono.

70-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 70-a UK estos en AŬGSBURGO /FRG/ inter la 3-a kaj 10-a de aŭgusto 1985. Se niaj membroj interesiĝas pri la kongreso, ili tuj skribu al nia adreso /ĈEA, Jilská str.10, 110 00 PRAGO 1/ke ni povu mendi vojagon de la ĈEDOK. Oni antaŭvidas la prezon minimume 8.000,-- Kĉs.

Riparo de la informo en Starto 1/84

Sur la paĝo 27 ni erare notis/ pri magnetofone servo/,ke " le numeroj 2 kaj 5 enhavas du ; n-ro 10 enhavas tri titolojn." Prave/ bone/ devis esti notita" La numeroj 2,5 kaj 10 enhavas du titolojn". Kazedo kun titolo" Madame Marie Curie " havas numeron 11.

BARBULOJ SE ĈINI

Zúčastnili se mírového setkání v Pardubicích a uvedli se mírovou písní při zahájení. Po oba večery hráli a zpívali svým návštěvníkům. Radovali se když se roztančil a rozezpíval celý malý sál. Pardubickým esperantistům za péči díky. V době od 6. - 8.4.1984 byli Barbuloj v Madarsku. Zúčastnili se setkání esp. mládeže "JER EN KECSKEMETH". Program byl bohatý a rozmanitý, nikdo z cca 400 mladých lidí se nenudil. Po oba večery úspěšně hráli a zpívali svým příznivcům. Loučili se neradi, budou rádi vzpomínat. Dávají k úvaze našim mladým esperantistům návštěvu této již tradiční akce " JUNULARA ESPERANTO-RENKONTIĜO - JER".

- NÝ -

N E O F I C I A L A S T A T I S T I K O

pri la situacio en kelkaj eŭropaj Esperanto-asocioj en socialismaj landoj. Prijuĝu vi ĉiuj mem kompare kun la situacio de E.-asocioj en la aliaj nesocialismaj landoj /ekzemple vidu artikolon pri Finlanda Esperanto-Asocio aŭ pri E-lernejo en Argentino/.

LANDA ASOCIO	PROKSIMUMA MEMBRARO	LOKAJ GRUPOJ	PAGITAJ OFICISTOJ	ŜTATA REKTA SUBVENCIO	MONO
Bulgara E.-Asocio	7.090	300	36	110.000	levoj
Ĉeĥa E.-Asocio	2.700	65	3,5	100.000	Kĉs
E.-Asocio en GDR	1.600	70	3	130.000	DM
Hungara E.-Asocio	6.500	170	18	800.000	toj forin-
Asocio de Sovetiaj Esp.	10.000	200	1	x/	rubloj
Slovaka E.-Asocio	2.000	60	3	117.000	Kĉs
Pola E.-Asocio	7.200	126	17	1,500.000	Zł.

x/ Asocio ne havas propran ekstran subvencion, sed estas pagitaj ĉiuj rektaj elspezoj el la SSOD budgeto.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10, 110 00 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6 foje jare. Responda redaktoro Zdenko KRIMSKÝ. Grafika aranĝo Milan LABAŠTA. Deseĝnaĵoj Pavel RAK. Transdonita al presejo la 20-an de aprilo 1984. Jarabono Kĉs 24,--, por eksterlanda Kĉs 36,-- aŭ 10,50 gld., inkluzive sendkostojn. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA aŭ rektvoje al nia asocio.

STARTO - nepravidelny věstník Českého esperantského svazu, Jilská ul. 10, 110 00 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko KRIMSKÝ, Grafická úprava Milan LABAŠTA. Kresby Pavel RAK. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven, Praha. Předáno do tisku dne 20. dubna 1984. Roční předplatné Kĉs 24,--, pro zahraničí Kĉs 36,-- nebo 10,50 guldem, včetně poštovních výloh. Dohlédačí pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovní povolen Reditelství pošt Praha pod č. jedn. P/1 - 1267 ze dne 6. dubna 1979.

Výtvarná řemesla Praha
 Vám nabízí široký
 sortiment bytových
 doplňků a dárkových
 a upomínkových pře-
 dmětů,
 vyráběných převážně
 v malých
 seriích s častou inovací.



Nabízíme: soustružené mocca soupravy
 soustružené odkládací stolky
 malované porcelánové soupravy i jedno-
 tvé kusy
 malované a broušené vázy, mísy a popel-
 niky
 výrobky z cínu
 bižuterii kovovou a koženou
 a další sortiment z kovu, kůže, koženky,
 textilu.

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

V našich prodejnách
 naleznete vhodné dárky
 pro každou příležitost.
 Naše pracovníci Vás
 ochotně obslouží
 a pomohou vybrat
 předmět,
 který potěší.

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
-----------------------------------	----------

přijímá objednávky na individuální zakázky
 nábytku a byt. doplňků.

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

Noviny

DOHLÉDACÍ POŠTA PRAHA 07,
SNÍŽENÝ POŠTOVNÍ POPLATEK
POVOLEN ŘEDITELSTVÍM POŠT PRAHA
J.ZN.P/1 - 1267/79 ZE DNE 6.4.1979